

La 50-a kongreso de ILEI

ILEI kongresos en Busan, 2017

La jubilea 50-a Kongreso de ILEI okazos en Busan, 15–22 julio 2017, antaŭ la 102-a UK okazonta en Seulo. LKK organizos karavanan veturon el Busan al Seulo por partoprenantoj de ambaŭ eventoj. La kongresa ĉeftemo de ILEI 2017 estos "Edukado al respektoplena turismo" omaĝe al la *Internacia Jaro de Daŭropova Turismo* deklarita de UN, kaj al la subteno de la Korea kaj Busana Turismaj Organizoj al ambaŭ kongresoj, UK kaj de ILEI.

Busan estas la dua plej granda urbo de Korea Respubliko ĉe la suda marbordo, ĝia grava turisma centro kaj granda havenurbo, kiu tra la historio rolis kiel pordo al eksteraj landoj. Ĝi harmonie kunigas la tradician kaj modernan vizaĝojn, kun belaj malnovaj temploj kaj spirhaltigaj modernaj konstruaĵoj. Dum la Korea milito ĝi restis neokupita de malamiko kaj tien venis rifuĝintoj el ĉiuj anguloj de la tuta Koreio. Tial, iliaj kulturoj estas harmonie interplektitaj en la urbo Busan.

La kongresejo estos en la moderna junulargastejo ARPINA. Ĝi situas en unu el la turisme plej viglaj distriktoj de Busano, Haeundae, ĉe la fama strando Haeundae, la plej ŝatata de ne nur koreoj, sed ankaŭ de alilandaj vizitantoj. Somere tie svarmas pli ol miliono da homoj. Multaj turismaj celoj kaj vizitindaĵoj troviĝas je promendistanco de ĝi, aŭ atingeblas per mallongdaŭra metro-veturo.

ARPINA disponas komfortajn dormoĉambrojn en ambaŭ stiloj eŭropa kaj korea, diverstipajn kaj diversgrandajn salonojn por diversaj kongresaj programoj, restoracion, bufedojn kaj sportajn ejojn kaj instalaĵojn, kiujn la kongresanoj povos uzi, ĉio sub unu tegmento kaj ĉio bonpreza, kun specialaj rabatoj por la grava evento de ILEI. Kun tia oferto kaj proksimaj turismaj vizitindaĵoj, ARPINA provizas taŭgan spacon por traktado de la kongresa temo "Edukado al respektoplena turismo" kaj por cetera, tradicie riĉa kongresa programo de ILEI.

Pliajn informojn vi trovos rete ĉe www.ilei.info.

Bonvenon ĉe ILEI en Busan!

Radojica petroviĉ, Estrarano pri kongresoj de ILEI